

La libro *Les Patries* de Jean Diedisheim, 2-a parto
Claude Gacond, 201-a radioprelego, 1967.08.16 & 1967.08.19

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni resumis la enkondukon de la libro titolita *Les Patries [La Patrioj]* verkita de Jean Diedisheim. Tiu eseo estas interesa komplemento al la verko de Edmond Privat *Interpopola konduto*.

A.- Dum Edmond Privat demonstris, ke « *ne ekzistas nur unu patrujo, mia patrujo, la patrujo, sed multaj patrujoj, niaj patrujoj, la patrujaro* », Jean Diedisheim aldonas en la enkonduko al sia libro, ke la kunfandiĝo de la nocioj **patrio** kaj **nacio** aŭ **ŝtato**, heredaĵo de la franca revolucio, ebligas al la registaroj uzi la emociigan enhavon de la nocio **patrio** profite al la soci-jura koncepto **ŝtato-nacio**.

Cl.- La du unuaj ĉapitroj de la libro de Jean Diedisheim raportas pri la origino kaj evoluo de la nocio **patrio**.

A.- La vorto *patrio* etimologie devenas de la latina adjektivo *patria*, kiu signifis **patra, praa** kaj kvalifikis la vorton **tero**. Etimologie patrio signifus do **pra-tero**.

Cl.- Tiu **pratero** aŭ **patrio** indikis unue la teron, kie estis honorataj la mortintoj aŭ protektantoj de la familio.

A.- Tiu **pratero** aŭ **patrio** difinis samtempe la publikan lokon situantan en la templo, kie la civitanoj honoris la heroojn kaj protektantojn de la civito.

Cl.- Ekzilo tiam signifis por civitano rompon de la kontakto kun tiu **pratero** aŭ **patrio**, do mankon de kontaktoj kun la protektantoj.

A.- Ekzistis do du **prateroj** aŭ **patrioj** : eta patrio, kiu estis la familia bieno kun ties tombejo kaj fajro ; granda patrio, kiu estis la civito kun ties templo ĉirkaŭata de sankta tero loĝata de la protektantaj herooj kaj dioj.

Cl.- La nocio patrio tiam estis do intime ligita al mistikaj konceptoj. Dum la modernaj tempoj oni povis ĉerpi el tiu antikva mistiko por akirigi al la nocio patrio sanktan signifon. Tio ebligis sanktigi la nacian kulton, sed tiu kulto kun flagoj neniel rilatas kun la antikva patria sankteco.

A.- Hodiaŭ ni distingas ankaŭ du patriojn : la eta patrio estas nocio, kiu ne plu kovras la familian bienon eĉ por kamparano, sed la naskiĝan lokon ; la granda patrio ne plu estas civito, kiun oni facile povas admiri el la plej proksima montosupro, sed la nacio, la ŝtato en kiu oni vivas. Por antikvulo ĝi estis nocio pri io ege konkreta. Por modernulo ĝi estas nocio pri io, kio devas esti imagita.

Cl.- En la antikveco dum la kvina jarcento antaŭ nia erao la patriotismo evoluis al nova signifo. Fido al la mortintoj kaj herooj malfortiĝis kaj lasis lokon al respekto al la publikaj institucioj kaj al la rajto, civitaneco kaj sekureco, kiujn ili garantias.

A.- Mistika sento iĝis intelekta kaj emociiga sinteno. Tiun sintenon oni devis kulturi, orientigi, eduki, kiel en la modernaj tempoj.

Cl.- Oni amis sian patrion, kiam oni povis ami ties politikan reĝimon. La propra opinio estis pli sankta, ol la propra naskiĝloko, kaj la venko de la propra patrio estis pli kara, ol la granda aŭ gloro de la propra civito.

A.- La Roma Imperio nutros alian patriotismon. Kiam ekzistos nur unu Imperio ĉirkaŭ Mediteraneo, tiam disvastiĝos nova patriotismo, en kiu oni admiros la potencon de la Roma

Imperio kaj la firmecon de ties institucioj kaj tradicioj. Estas speco de imperiismo simila al multaj modernaj patriotismoj.

Cl.- Kristanismo kaj stoikismo ne plu akceptos, ke la homa persono estu oferata por la ŝtato. La supera merito por kristanoj aŭ adeptoj de la stoika filozofio ne plu estos vivi aŭ morti por la Imperio.

A.- Tio anoncas la malaperon de la nocio patrio. Mezepoko ĝin ne konas. Ĝi reaperas dum la renesanca epoko. Kunvivados dum kelkaj jarcentoj du patriotismoj. Por unuj patriotismo estas fideleco kaj obeemo al la reĝo. Sed sub influo de la greka literaturo kaj vivo en liberaj komunumoj por aliaj patriotismo estas ligita al la nocio libereco. Tiun patriotismon kulturos la enciklopediistoj.

Cl.- La Bruyère jam skribis: « *Ne ekzistas patrio en la despotismo ; aliaj aĵoj ĝin anstataŭas : profitemo, gloro, servo al la princo.* »

A.- Dum la periodo de la enciklopediistoj formiĝas pluraj konceptoj. La terminoj nacio kaj patrioto preciziĝas.

Cl.- Nacio signifas suverenan popolon.

A.- Kaj patrioto personon, kiu povas koncepti sian landon nur kun ena kaj ekstera libereco aŭ sendependeco.

Cl.- Dum la entuziasmo de la franca revolucio, kiam la franca nacio fariĝis suverena, la nocio patrio akiris novan signifon. Patrio sinonimis al Nacio. Defendi la francan nacion aŭ defendi la patrion havis la saman signifon. Nocio konkrete ligita al la naskiĝa loko cedis la lokon al ideologio. Patrio fariĝis sistemo ligita kun la Homrajtoj.

A.- Tiu kunfandiĝo inter la nocioj **patrio** kaj **nacio** disvastiĝos iom post iom al la tuta mondo. Hodiaŭ la sinonimiĝo de tiuj du nocioj estas fakto akceptata de la juristoj. **Marcel Prélot** ekzemple povis aserti en 1957, parolante pri la **Ŝtato** :

Cl.- « *Oni naskiĝas en ĝi, oni vivas en ĝi, oni mortas en ĝi, kaj eĉ oni mortas por ĝi.* »

A.- Dum la franca revolucio kunfandiĝis du aliaj nocioj : la nacia defendo kaj la armeo.

Cl.- La armeo pli kaj pli simbolos la patrion, kaj naskiĝos nova patriotismo kun batalkrioj, marŝokantoj kaj propra mistiko. Por Jean Diedisheim tiu patriotismo estas falsa patriotismo.

A.- Patriotismo estas sento treege kompleksa, kiu ofte implicas nociojn pri prospero, riĉo, bonfarto, gloro kaj amo.

Cl.- Kiel **Edmond Privat** en *Interpopola konduto*, **Jean Diedisheim** priskribas la universalan fenomenon. Kion li asertas, tio ne konvenas nur al la franca patrio, sed al iu ajn patrio. Pro tio ni pensas, ke lia libro *Les Patries [La Patrioj]* povas helpi la esperantistojn repensi sian mondkomprenon.

AS.- En la venontaj prelegoj ni daŭrigos la prezenton de tiu eseo pri la kolizio de la patriotismoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-